

Oficiala organo de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai (UHA)

# Oomoto

n-ro 454  
2007  
jan.-dec.



ISSN 0388-0672

# BONVENON AL OOMOTO EN 2007

***Post la 92a Universala Kongreso en Jokohamo okazis “Bonvenon al Oomoto en 2007” en la sankta tereno de Oomoto en Ajabe de la 11a ĝis la 14a de aŭgusto. 74 samideanoj el 13 landoj partoprenis la eventon.***

**P**artoprenantoj alvenis al Ajabe vespere en la 11a de aŭgusto; ili registris partoprenon ĉe la akceptejo, kaj ricevis la klarigon pri la programo kaj tereno.

**J**e la 7a vespere okazis bonveniga festeno, “Granda Interamikiĝa Kunveno,” en la placo antaŭ la preĝejo Miroku-den. Frandaĵoj kaj trinkaĵoj bonvenigis ilin, kaj belaj voĉoj de brazilana koruso malfermis la festenon. Dum unu horo oni ĝuis kulturen interŝanĝon — tradicia korea danco, kantoj kun gitaro, japanaj dancoj, interalie multaj ĉeestantoj kune dancis la Aŭa-dancon, faman japanan folkloran dancon; kelkaj ĉeestantoj salutis, kaj en la fino

ĉiuj ĉeestantoj ĝuis piroteknikaĵojn.

**J**e la 10a matene en la 12a de aŭgusto, oni celebris la malferman ceremonion en la Sanktejo Ĉoosei-den. Ĉefcelebranto Kyotaro Deguchi recitis la preĝvortojn en Esperanto, kaj reprezentantoj el la alilandaj partoprenantoj oferis pinbranĉetojn al la altaro. Post la diservo, la Spirita Gvidantino Kurenai Deguĉi salutis al la ĉeestantaro. Ĉefdirektoro de Oomoto Kunihiko Ŝimamoto salutis reprezentante la organizantojn. Oni ankaŭ prezentis la mesaĝojn el Universala Esperanto-Asocio, Japana Esperanto-Instituto, kaj Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj.



# Bonveniga Saluto

Kurenai Deguči

La Spirita Gvidantino de Oomoto

*Karaj geamikoj,  
Nun mi sentas min tre feliĉa,  
akceptante en la sankta tereno de  
Ajabe 74 samideanojn el 13 landoj en  
la mondo.*

*Mi elkore  
gratulas vin  
pro la sukcesa  
kaj prospera  
malfermo de la  
92a Universala  
Kongreso de  
Esperanto, kaj  
samtempe, mi  
multe dankas  
vin pro tio ke vi*



*bonvolis ĉeesti en la faka kunsido de  
Oomoto, okazinta posttagmeze en la  
5a de aŭgusto. Kaj mi tre ĝojas ke al  
mi prosperas revidi vin.*

*Dum tri tagoj ekde hodiaŭ, kvankam  
la periodo estas mallonga, bonvolu  
sperti la japanajn tradiciajn artojn,  
nome, no-dramon, ĉanojon,  
kaligrafion, budoon k.a. kaj mi estas  
feliĉa, se vi povos tuŝi la etoson de  
la sankta tereno, kaj ĝui la belajn  
kulturon kaj naturon de nia lando  
Japanio.*

*En la 14a, nome, la lasta tago de la  
programo, ni organizos utafeston kaj  
kune preĝos al Dio pri la mondpaco.  
Mi pensas, ke la okazigo de la*

*u t a f e s t o  
kunlabore kun  
vi, ne japanaj  
amikoj, havas  
g r a n d a n  
s i g n i f o n ,  
precipe en la  
nuna tempo,  
kiam pli kaj  
pli intensiĝas  
la konfliktoj  
inter nacioj kaj*

*inter religioj kaj kiam oni prikras la  
ekstermiĝon de vivaĵoj en la naturo.*

*Mi kredas, ke ĉi tiu utafesto prezentos  
bonan modelon por la utafesto,  
eventuale okazonta en la proksima  
estonteco en Jerusalemo. Kaj mi  
elkore deziras, ke ĉi-foja evento fariĝos  
unu granda paŝo por tio.*

*Do, karaj geamikoj, ĉar nun Japanio  
troviĝas en la plej varma sezono,  
bonvolu zorgi pri via sano kaj pasigu  
la tempon, plenan je ĝojo kaj signifo,  
mi elkore deziras. Koran Dankon!*





D-ro Benedict Silva el Brazilo, Prof. Lee Jung-kee el Koreio kaj S-ro Chimedtseren Enhkee el Mongolio salutis reprezentante la partoprenantojn. Oni prezentis japanajn tradiciajn artojn: muziko de Jakumo-kotoo, noa muziko de mantamburo kun ĉantado, du pecoj de noa danco, laste 50 membroj de la Koruso Ĉielo kantis du kantojn: “la Espero” kaj “Fundamenta Misi-kanto de Oomoto.”

**P**osttagmeze, oni vidis la videofilmon “Paŝoj de Oomoto” kiu prezentas la historion de Oomoto, kaj oni aŭskultis la parolojn pri Oomoto, kaj pri Uta-festo kiu estas diservo oferi preĝon por paco en la formo de tankao.

**V**espere, partoprenantoj vizitis la te-ĉambron Konohana-an, ceramikejon, kaj teksejon en la tereno de Oomoto. Oni servis verdan teon kaj dolĉaĵon en la te-ĉambro, kaj sub la lumo de lanternoj oni regalis la gastojn kun sakeo (japana rizvino) en la ĝardeno apud la lageto. En la ceramikejo, samideanoj desegnis la ceramikajn tasojn kiujn oni poste bakis kaj donis al ili. En la teksejo ĉeestantoj vidis la ceramikajn artverkojn de la Spirita Gvidantino, kaj observis la teksadon de la stabanoj, kaj kelkaj ĉeestantoj spertis ĝin.

**E**n la mateno de la 13a de aŭgusto, partoprenantoj apartiĝis en du grupojn por sperti la japanajn tradiciajn artojn:







teceremonio, kaligrafio kaj Aikidoo. Unu grupo eniris en la teĉambron kaj praktikis la etiketon de teceremonio, kaj ricevis la dolĉaĵon kaj verdan teon. Alia grupo faris tuĉskribon, kaj kopiis la skribaĵon de la Fondintino kun tuĉpeniko, poste ili vidis la prezentadon de Aikidoo, kaj kelkaj ekzercis sin je la tekniko.



Posttagmeze geamikoj aŭskultis la parolon, “Vojmapo al la Miroku-Mondo (Ideala Mondo).” Post la parolo Ŭombulismaj samideanoj prezentis la korean teceremonion kaj donis la floran teon al la ĉeestantoj.

Geamikoj enbusiĝis kaj vizitis alian sanktan terenon de Oomoto en Kameoka. La geamikoj surmetis jukatojn (somerajn kimonojn), kaj partoprenis en la Miroku-danco (folkloro danco ĉe Oomoto) kiu estis la programero de Geknaba Festo de Oomoto tie koincidanta. Partoprenantoj ege ĝuis la dancon kune kun geknaboj.

Matene de la lasta tago, la 14an de Maŭgusto, preĝofero por paco, Uta-festo de Oomoto, okazis sur la noa scenejo





en la Sanktejo Ĉoosei-den. La partoprenantoj kaj Oomotanoj entute pli ol du cent personoj ĉeestis ĝin. Esperantistoj tra la mondo kaj Oomotanoj oferis preĝon en la formo de utao aŭ tankao, 31-silaba poemo. La oferataj poemoj nombriĝas entute 451 pecoj. En la Uta-festo oni ĉantis nur selektitajn 44 tankaonj, el kiuj kvin poemoj ricevis la premiojn.

**U**nu el la kvar ĉantistoj de la Uta-festo estis s-ino Ildete Barbosa de Aquino el Bona Espero en Brazilo. Ŝi restis en Oomoto de marto kaj praktikis la ĉantadon diligente dum du monatoj.

**T**iu ĉi Uta-festo estis la unua provo. Oni solenis la tutan feston nur en la lingvo internacia—la prezidanto anoncis la



programerojn en Esperanto, kaj oni ĉantis la utaojn en Esperanto. Tiu ĉi Uta-festo estis grava provo por estontaj Uta-festoj celebrotaj en Brazilio kaj en Jerusalemo.

**K**vin utaoj gajnis premiojn: Ĉefcelebranto Kyotaro Deguchi gratulis la kvin premiitojn kaj transdonis la premiojn al ili.

**P**ost la Uta-festo, kelkaj reprezentantoj de la partoprenantoj salutis kaj esprimis siajn impresojn pri la programo. Reprezentante la organizantojn, Ĉefdirektoro Tokio Kanakogi de EPA, dankis al la geamikoj por ilia partopreno. Plej laste ĉiuj kunkantis la kanton “Tagiĝo”, kaj la tuta programo fermiĝis. Jenaj kvin utaoj premiiĝis:







Premio Akso, s-ino Inge Demmendaal el Nederlando

Senkondiĉe ja  
Bezonas akvon, teron  
Kaj aeron ni,  
Ĉar ni egale estas  
Samkultura la homar’.

Premio Akso, d-ro Benedicto Silva el Brazilo

Brazilano mi  
Kun la anim’ nipona  
Kaj la sent’ en kor’  
Jamato-damaŝii,  
Tamen, por la monda pac’.



Premio Homo, s-ro Makoto Niŝinaga el Japanio

En mezorient’,  
Geknaboj nepovintaj  
Veni al Nipon’  
Lastsomere, kun jukatoj  
Kaj rideto en la fot’.

Premio Tero, Prof. Lee Jung-kee el Koreio

Ĉiuj venis, jen,  
Disĉiploj de la paco,  
Mane kun rozflor’,  
Ni paŝas kaj ni paŝas,  
Ĉu al plene paca mond’.







Premio Ĉielo, s-ino Rena Jonkova el Bulgario

Ĉarma verda ter',  
Planedo mia sola,  
Timo kaptas min...  
Mirinda bela globo,  
Kial ni dividu ĝin?



# Preĝvortoj por Raporta Diservo

*Nu, la plej sankta kaj la plej majesta Mastra Dio, la kreinto de ĉiuj estaĵoj en la universo, kiu degnas resti en ĉi tiu Preĝejo Ĉoosei-den antaŭ vi, ĉefcelebranto DEGUĈI Kyotaro, humile kaj respektoplene parolas.*

*La senlime granda majesteco de la prapatra DIO trabilas ĉiudirekte inter la ĉielo kaj la tero kaj laŭ Via sankta plano, grandioza kaj preciza, ni interkonsiliĝis kaj decidis organizi en la daŭro de 4 tagoj ekde la 11-a de aŭgusto internacian amikan kunvenon de Esperanto "Bonvenon al Oomoto en 2007!"*

*Do, oferante sur la altaro diversajn frandaĵojn, produktitajn el maro, rivero, monto kaj kampo, ni elkore servas por la raporta diservo, pro tio, bonvole aŭskultu kaj akceptu nian plej sinceran preĝpeton: ĉiuj reprezentantoj, kunvenantaj ĉi*

*tien en Oomoton, ellernu la moralan tendencon de la instruoj, montritaj de Gefondintoj kaj Gegvidantoj, kaj montru la lumon de Esperanto en kaj ekster la lando, kaj partoprenu en la granda Dia*



*entreveno por konstrui la eterne pacan mondon, en kiu ĉiuj homoj kunvivos trankvile, plezure kaj prospere.*

*Do, Mastra Dio, ke en Viaj virto kaj favoro, ĉi tiu kunveno "Bonvenon al Oomoto en 2007!", estu malfermita kaj plenumita sukcese, ni preĝpetas al Vi elkore kaj sincere, humile kaj respektoplene.*

# Bonveniga Saluto

Kunihiko Ŝimamoto

Ĉefdirektoro de Oomoto

Bonan tagon!

Bonvenon al Oomoto!

Hodiaŭ al ni prosperas havi multajn gastojn, vizitintajn el 13 landoj; do, al



vi ĉiuj mi esprimas elkoran dankon.

Dum tri tagoj ekde hodiaŭ, ni prezentos al vi japanajn tradiciajn kulturojn kaj precipe Utafeston, kiu estas unu el la gravaj diservoj de Oomoto. Utafestoj estas antikva kultura evento, interrompita jam antaŭ multaj jaroj, kiun Majstro Onisaburo DEGUĈI, Kunfondinto de Oomoto, revivigis en 1935; Ĝi estas sankta evento, en kiu

homoj pripreĝas homaran unuiĝon kaj mondpacon, versante utaojn kaj oferante ilin al Dio. Ordinare, ĝi estas celebrata en japana klasika lingvo, sed ĉi-foje, ni permesas al ni celebri en Esperanto. Mi sentas grandan signifon je tio, ke ni povas servi por la utafesto pripreĝi la pacon de la mondo per unu komuna lingvo kune kun vi el diversaj landoj sur la tero. Ni kune preĝu al Dio laŭeble fruan realiĝon de la eterna paco.

Dum la periodo, ni, ĉiuj koncernuloj, sincere kaj elkore zorgos pri vi. Se vi havos ian problemon, bonvolu anonci al ni senhezite. Cetere, ĉar ni nun troviĝas en la mezo de la plej varma sezono, bonvolu koncentri vian atenton sur la sanan kondiĉon. Sincere dezirante ke la tri tagoj estu signifoplenaj por vi, ĉiuj, mi finas mian saluton. Koran dankon!



## Saluto al la kunveno

“Bonvenon al Oomoto en 2007!”

Renato Corsetti

Estimata Deguĉi Kurenai, la kvina spirita gvidantino de Oomoto, karaj membroj de Oomoto, karaj esperantistoj.

Ofte homoj demandas: Ĉu Esperanto havas kulturojn? Kaj tiam ni respondas kaj citas tradukitajn librojn kaj centojn da ĉiujaraj kunvenoj. Tia respondo estas ĝusta, sed ni forgesas pri la apartaj trajtoj de la Esperanto-kulturo, de la kulturo, kiun vi trovas ĉe esperantistoj en la klubo de Rio-de-ĵaneiro kaj de Vilno, de Romo kaj de Pekino. Inter tiuj komunaj trajtoj, eble samnivele kun la ekzisto de la akuzativo, ni trovas oomoto-n.

Ĉiuj esperantistoj scias pri Oomoto kaj amas ĝin. Oni amas ĝin ankaŭ ĉar Oomoto tre klare kaj ne kaŝe, ne reteneme anoncas sian celon pri unu mondo kaj unu interlingvo. En la Centra oficejo de Oomoto, en Kameoka, troviĝas la Esperanta Monumento kun la devizo de oomoto-agado: Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo. Ni esperantistoj nepre interesiĝas pri Unu Mondo kaj Unu Interlingvo, sed antaŭ ili por Oomoto estas Unu



Dio, kiu montras, ke “ĉiuj religioj originas el sama fonto”, nome Unu Dio. Pro tio oomotanoj fidele sekvas tiun koncepton ekde antaŭ 84 jaroj, efektive praktikante la religian kunlaboron trans la diferenco de la instruoj kaj moroj de la malsamaj religioj, por ke oni konstruu la mondopacon sur la tero laŭ la volo de Dio.

Esperantistoj mem en la lastaj tempoj estas tre pli retenemaj, kiam oni demandas ilin: kiuj estas viaj celoj? Ĉu vi vere volas ke la tuta mondo parolu unu interlingvon, Esperanton.

Iam en la tempoj de Zamenhof oni klare respondis, ke Esperanto celas

esti ĉies dua lingvo. Hodiaŭ eĉ ni ofte timas aserti tion. Oomoto ne timas, sed tio ŝuldiĝas al ĝia interna idea forto, kiu baziĝas sur kredo profunda kaj sincera. Kaj oni ja rajtas ankaŭ respondi tiel, ĉar en la nuna momento Esperanto vivas sian printempon en Azio, en Afriko kaj en Ameriko. La Esperanto-movado en tiuj kontinentoj ne stagnas, danke, interalie al spiritaj movadoj, kia estas Oomoto.

Vere, mi estas la lasta homo taŭga por paroli pri religiaj aferoj. Eventuale mi eĉ devas peti vin, ke vi memoru pri mia perdiĝinta, raciista animo en viaj preĝoj. Tamen mi volas diri ion pri oomoto kiel fidela aliancano de la Esperanto-movado. Mi volas almenaŭ danki vin pro via agado, kaj mi volas instigi vin al plua agado.

Granda tasko de esperantistoj ĉiam estis okupiĝi pri dialogo inter kulturoj, trans kulturaj limoj.

Por tiuj rilatoj Esperanto povas utili multe pli bone ol la angla, ĉar ĝi estas pontolingvo, lingvo de neniu, kaj ne lingvo de unu el la diskutantaj partioj, la okcidenta.

La verkoj de Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, dum la unua periodo de la vivo de la internacia lingvo havas tian moralan tension, tian elektran ŝargon de idealoj kaj deziroj kontribui al pli bona mondo, ke ili apenaŭ estas kompreneblaj de la nuntempaj okcidentaj homoj,

riĉaj kaj senesperaj, kies nura deziro estas savi la planedon el la pereco, al kiu miskomprenita ideo pri libereco portis ĝin.

Mi kredas ke oomotanoj tre pli bone ol aliaj povas kompreni tiun moralan tension kaj povas igi ĝin laboranta forto por tiu interkultura kaj interreligia dialogo, kiun la nuna mondo bezonas. La manko de tia dialogo, la obstina rifuzo provi kompreni tion, kio estas en la menso de la aliaj, estas ĉe la bazo de la militoj kaj atencoj nuntempaj multe pli ol la manko de okcident-stilaj regmanieroj en kelkaj landoj.

Ni ĉiuj estas kune en ĉi tiu boato, la mondo. Ni ne detruu nian boaton per uzado de ties ligno por aliaj celoj kaj ni ne intermurdu unu la alian inter la boatanoj. Ambaŭ tiuj aferoj portos al la subakviĝo de ni ĉiuj.

Por ke tio ne okazu oni bezonas fortojn, kiuj povas helpi la boatanojn, tio estas la homarao, kompreni la esencon de la homa naturo kaj de la kunvivado inter homoj. Oomoto estas unu el tiuj fortoj kaj la Esperanto-movado fieras pri ĝi.

Multajn sukcesojn en la estonteco al Oomoto! Bonan interkonatiĝon kun ĝi al la esperantistoj, kiuj akceptis la inviton de Oomoto!

Nome de Universala Esperanto-Asocio

La prezidanto

Renato Corsetti

# Impresoj de partopreninto

Inge M. Demmendaal

Nederlando

Kiam mi aŭdis, en oktobro 2006, ke Oomoto organizas la programon "Bonvenon al Oomoto en 2007!" kiu okazos sekve al la Universala Kongreso en Jokohamo, mi tuj aliĝis.

Jam en 1995 mi partoprenis la unumonatan kurson de Oomoto pri la japanaj tradiciaj artoj, kiu okazis ĉefe en Kameoka. De tiu kurso mi prenis hejmen daŭranta fascinan por la Vojo de Teo. Kiam mi havis la eblecon, mi konstruigis japanstilan teĉambron

en mia domo kaj komencis sekvi telecionojn, kiuj estas instruataj de la Urasenke temastro en Nederlando.

En la posttagmezo de sabato, la 11-a de aŭgusto 2007, kunvenis 74 partoprenantoj el 13 landoj por la evento. Ek de la unua minuto ĝis la lasta, la gastamo de Oomoto estis evidenta.

Aŭtobusoj jam atendis nin apud la stacidomo de Ajabe, kaj rapide transportis nin al la sankta tereno de Oomoto.

Post registrado kaj la asigno de ĉambroj,

klarigo pri la programo kaj domreguloj, ni estis regalataj per abunda kaj bongustega bankedo, ekstere, en la placo antaŭ la preĝejo Miroku-den, lumigita per dekoj da paperaj lampionoj. La cikadoj kantadis laŭte en la arboj, kontribuante al la amika kaj bonveniga etoso.



Disfaldis festa kunveno kun dancado, kantado, muziko, kaj salutantaj vortoj de kelkaj de la partoprenantoj kaj, fine, bela fajraĵo.

Ĉiutage mi volonte ĉeestis en la diservo

je la 6a matene en la sanktejo Ĉooseiden. Post purigado per Oonusa-o, sekvis la preĝoj Amatsu Norito kaj Miyabi no Kotoba, kiujn mi tutkore kunĉantis. Reveninte hejmen, mi daŭrigis preĝi Amatsu Norito ĉiumatene.

Post matenmanĝo estis ebleco rigardi partojn de la tereno: Miroku-den, Ĉooseiden, la puto kie Mastrino Nao ekhavis siajn Diajn Revelaciojn, la lago de Mastro Onisaburo enhavanta la kvin insulojn, kiuj reprezentas la kvin mondpartojn.



Je la 10a horo, la malferma ceremonio de la programo okazis en Ĉoosei-den, pere de koto-muziko, la oferado de pinbranĉetoj al la altaro, enkondukadoj kaj salutoj de la Spirita Gvidantino, la organizantoj kaj partoprenantoj.

La Spirita Gvidantino kondukis la preĝadon tre impresive. Sekvis Noa muziko, Noa kantado, du No-shimajoj, kaj la Ĉielokoruso kantis du kantojn en Esperanto.

Posttagmeze, unue ni vidis la videofilmon "Paŝoj de Oomoto", kun movantaj bildoj de preskaŭ ĉiuj Spiritaj Gegvidantoj. Estis granda ĝojo vidi tiun filmon.

Sekvis prelego de s-ro Tanaka pri "Kio estas Oomoto?" kaj vasta klarigo pri Uta-festo de s-ro Hazama.

Vespere, dividitaj en 3 grupoj, ni vizitis Miroku -Mura, la arta sekcio de Oomoto.

La ceramikejo kun multaj bretoj plenaj de ceramikaĵoj estis tre impresaj, kaj klarigo pri la bakforno estis ege interesa. Ekstere, apud la ceramikejo, ni ĉiuj povis ornamu trinkujon kaj, post bakado, preni hejmen.

En la apuda ĉambro troviĝis la ceramikaj artverkoj de la nuna Spirita Gvidantino, kiujn ni povis admiri kaj eĉ manteni. La tebovlo nomita Unua Krieto estas vera majstroverko.

De la ceramikejo ni promenis al la teksejo. La inĝenieco de la teksiloj ĉiam fascinas

min.

Post la teksejo ni vizitis Konohana-an, la tedomo kun belega etoso, kie ni ricevis bovlon da malvarma verda teo kaj ekstere, tason da rizvino. Sidante sub la arboj (kun kantantaj cikadoj), ĉirkaŭigitaj de paperaj lampionoj, mi spertis profundan spiritan unuiĝon kun la universo.

Lundon matene, la 12a de aŭgusto, estis ebleco sperti kaligrafion kaj aikidoo-n, aŭ la teceremonion, precipe partopreni kiel gasto. Ni ricevis eksplikon kiamaniere eniri kaj eliri la teĉambron, kaj lernis la etiketon pri la uzado de la ventumilo, kiamaniere uzi la kaishi

paperon kaj lignan pikilon,

akcepti kaj konsumi la dolĉaĵon kaj teon. Ni lernis pri la koncepto de Ŭa Kei Sei Ĵaku (harmonio, respekto, pureco, soleco). En tiu ĉi ĉambro pendis "Akegarasu", pentrita de Mastrino Sumiko: tri korvoj grakas je tagiĝo, simbolante esperon.

En la tokonoma-o de la alia ĉambro pendis belega kaligrafio de Mastro Onisaburo, signifanta "Monto alta, akvo longa". Ambaŭ gemastroj ĉeestis, per siaj artverkoj.

Estis grandega honoro al la partoprenantoj!

Posttagmeze s-ro Maeda prezentis la prelegon "Vojmapo al la Miroku-mondo"- ideala mondo sen malsano,



sen krimo, sen ĵaluzo. Post la parolo, kelkaj partoprenantoj de Koreio montris la Korean teceremonion kaj disdonis bongustan floran teon al la ĉeestantoj.

Kvar luksaj aŭtobusoj transportis nin al la sankta tereno de Oomoto en Kameoka, kiun mi konsideras mia spirita hejmo. Post farado de rememoriga foto apud la Oomoto-monumento kaj vespermanĝo, ĉiuj partoprenantoj ricevis jukaton, someran kimonojn, kaj getaĵojn, lignajn ŝuojn.

Post instruo de la danco nomita Miroku-Ondo sur la placo antaŭ la sanktejo Banŝoden, nia tuta grupo

eniris la terenon de la Geknaba Festo, tie koincidanta. Kelkaj de la partoprenantoj formis teamojn kaj konkursis per dancado. S-ro Saito kantis kelkajn de la strofojn en Esperanto.

Kelkfoje, ankoraŭ mi dancas Miroku-Ondo en mia hejmo – bedaŭrante ke mi ne havas la muzikon. Kaj kelkfoje mi rigardas la medalon (kun du oraj steloj) kiujn mi ricevis pro danco fervora! Ankaŭ, nia teamo gajnis premion.

Je la 10a matene de la lasta tago, aŭgusto la 14a, okazis la zenito de la programo: la Uta ceremonio en la sanktejo Ĉooseiden. La ceremonio estis gvidata tute en Esperanto.

Sur la Noa scenejo staris la tanka-arbo kun

la sanktaj kaj dediĉitaj tankaĵoj, poemoj de 31 silaboj, kiel preĝofero por mondpaco. La ceremonio estis tre speciala kun koto-muziko, belegaj dancoj kaj la ĉantado de la sanktaj tankaĵoj verkitaj de ĉiuj spiritaj gegvidantoj. Sekvis la ĉantado de la 45 dediĉitaj tankaĵoj. Kvin el la senditaj tankaĵoj estis premiitaj en kvar kategorioj: Akso, Tero, Homo kaj Ĉielo. Estas



granda honoro ke mia tankaĵo gajnis premion en la kategorio Akso. S-ro Deguĉi Kyotaro transdonis la premion: belegan someran tebovlon, farita de ceramikmajstro

Kaneshige Yuuhou.

Retrorigardante, “Bonvenon al Oomoto en 2007!” por mi estis kor-ĝojigaj, oraj tagoj, kiujn mi neniam forgesos. Tiuj ĉi tagoj pliriĉigis mian vivon, certe ankaŭ pro la fakto ke mi renkontis bonegajn homojn.

Volonte mi esprimas multan dankon al la organizintoj de la evento, precipe al s-ro Agou kiel ĉeforganizinto, kaj al ĉiuj kiuj ebligis la programon, aŭ plenvideble, aŭ postkulise.

## *Neforgesebla epizodo en Ajabe*

**KIM Uson  
Koreio**

Tuj post la 92-a UK en Jokohamo, la 11-an de aŭgusto, mi kun 26 koreaj kaj multaj eksterlandaj samideanoj kune direktiĝis al Ajabe, Japanio, kie okazis la evento "Bonvenon al Oomoto en 2007!" dum 4 tagoj ĝis la 14-a tago. Mi restis tie nur 4 tagojn, sed dume okazis la aferoj, kiujn mi ne povus facile forgesi. Jen mi prezentas la anekdotojn.



Kiam ni, la partoprenantoj atingis la dormejon Ŝookoo-kan en la sanktejo Bajŝoo-en, Ajabe, ĉiuj unue iris en sian propran ĉambron, por demeti siajn valizojn. Ni uzis kune kun 3 aŭ 4 homoj en 1 ĉambro. Kaj sur la pordoj de la ĉambroj estis skribitaj la nomoj de la loĝantoj en ĝi. Eble, la aranĝantoj ne povis distingi sekson per la nomoj de eksterlandanoj. Tial ili fojfoje aranĝis, ke geviroj kune uzu saman ĉambron. Ni ridegis antaŭ la pordoj, kie la nomoj estis tiel aranĝite

skribitaj. Kaj s-ro KIM Jin-ho, kiu trovis sian nomon kunmetitan kun tiuj de 3 sinjorinoj en mia apuda ĉambro, mallaŭte diris: "Ne diru la aferon al aliaj homoj." Je lia ŝerco eksplodis ridegoj.

La loĝantoj mem solvis la problemojn, ŝanĝante la ĉambrojn unu kun la alia.

Mia propra ĉambro estis n-ro 308 en Ŝookoo-kan. Mi uzis ĝin kun 3 koreaj koleginoj.

En la unua nokto (11-an de aŭg.), ni, la kunloĝantoj disvolvis la litaĵojn sur la tatamoj por dormi. Kiam miaj ĉiuj samĉambranoj kuŝiĝis sur sia lito, mi malsupreniris sur la 1-an etaĝon de Ŝookoo-kan por preni botelon da akvo. Reveninte en la ĉambron, mi malŝaltis la etan lampon, kiu prilumis la antaŭ ĉambreton de mia dormejo, eniris en tiun nigran ĉambron kaj kuŝiĝis sur la litkuseno. Kaj en la mallumo, mi, serĉis litkovrilon vatitan, kiun mi ĵus antaŭe



disvolvis sur la litkuseno por kovri min. Sed en miaj manoj ne kaptiĝis vatita litkovrilo, sed nur littuko. Mi palpis la litkusenon de unu rando ĝis la aliaj, sed estis vana afero. Ĉar mi ne povas facile endormiĝi kun littuko eĉ en somero, mi do senbrue kaj singarde rampis al la muro kaj ŝaltis la lampon por trovi la litkovrilon. Je mia surprizo, 3 sinjoroj, k o v r i n t e s i n p e r littuko, estis dormantaj en la ĉambro. Mi elsaltis el la ĉambro eĉ ne preninte la akvobotelon. Elkurante mi retrorigardis la pordon. ĝia numero estis 208.



Kaj en nia ĉambro, mi flustre rakontis la aferon al f-ino MIN Hyeon-kyeong (ĝenerala sekretario de KEA), kiu ankoraŭ ne dormis tiam. Ni en la malluma ĉambro susurante ridegis por ne malhelpi la apudajn dormantojn.

En la sekva mateno, ankoraŭ foje okazis simila afero. Juna s-ro ENKHEE Chimedtseren (ĝenerala sekretario de Mongola Esperanto-Societo) erare malfermis la pordon de mia ĉambro, kaj li surprizita elkuris, kiel mi en la antaŭa nokto. Mi supozas, ke li estis la loĝanto sur la lito en la ĉambro 208, kie

mi momente kuŝis en la antaŭa nokto, ĉar mi memoras, ke mi ne vidis tian junulon el la 3 dormantaj sinjoroj kaj tiam oni uzis la ĉambrojn sur la 2-a kaj 3-a etaĝoj en Ŝookoo-kan.

Kiam ajn mi rememoras la nokton, mi ridas sola kaj ege dankas pri la fakto, ke tiunokte vatita litkovrilo ne troviĝis sur la lito en la ĉambro 208. Se la lito

estus kovrita per vatita litkovrilo, mi, kiel kutime, tuj profunde dormus en ĝi. Kaj kio okazus, kiam la rajtanta de la lito revenus e n s i a n ĉambro en tia situacio?

Kaj domaĝa afero okazis en la interkona vespero (11-an de aŭ.). S-ro Jasuo TABUĈI, mia tre afabla amiko en Japanio, donacis al mi skatolon da kimĉio, tuj kiam mi atingis Ŝookoo-kan. Li scias, ke koreoj sentas malfacilon sen kimĉio. Mi, kun granda ĝojo kaj dankemo al li, volis provi ĝin en bankedo en la interkona vespero, okazinta en ĝardeno antaŭ la preĝejo Miroku. Sed tio ne eblis. Mi ne povis eĉ malfermi la skatolon. Mi estis kun polinoj, bulgarinoj ktp ĉe la manĝotablo. Mi timis, ke mi ĝenus la kunsidantojn per laodoro de kimĉio. Mi do intencis

manĝi ĝin en la sekva tago. Kaj post la bankedo, la ĉeestantoj kune aranĝis la ejon. Ankaŭ mi kunlaboris kun ili. Kiam mi revenis al mia tablo forĵetinte la uzitajn telerojn en rubujon, mi trovis, ke malaperis mia kimĉio, kiun mi metis sur la tablo. Mi, supozante ke iu forĵetis ĝin en rubujon, serĉis kaj serĉis en ĉiuj rubuoj, sed mi ne povis trovi ĝin. En la sekva tago, kiam mi renkontis s - r o n TABUĈI, mi mensogis al li, ke mi manĝis la kimĉion tre bonguste. Mi ne volis dolori lian koron.

Manĝante kimĉion en mia hejmo, mi ofte domaĝas la perditan en Bajŝoo-en kaj dankas al la bonkora kaj sincera amiko, s-ro TABUĈI.

Jam pasis 1 monato, de post kiam mi revenis mian hejmon de la Oomoto-sanktejo, sed mi ofte tre bele rememoras la tagojn de Ajabe. Min impresis la kvieta atmosfero en Bajoo-en, la luksaj manĝaĵoj, la diversaj kaj interesaj programeroj. Ni vizitis la malnovajn tedomon, teksejon kaj ceramikfarejon; spertis japanajn teceremonion, kaligrafion kaj Budoon; vizitis ankaŭ la centran oficejon de Oomoto en

Kameoka. Kaj tie ni vestinte nin per japana vesto lernis Miroku-dancon kaj partoprenis en la geknaba festo de Oomoto.

Mi ree mergiĝis en la etoso de Oomoto 16 jarojn poste de la 1991-a jaro, kiam mi partoprenis transjaran kurskunvenon de EPA en Kameoka. Kaj



mi konstatis akuratecon kaj afablecon de oomotanoj. Unu aferon mi tre bedaŭras, ke mi ne povis trovi tempon ĉirkaŭ rigardi la Oomoto-sanktejon Ten'on-kjoo en Kameoka.

Mi deziris refoje vidi la terenon post 16 jaroj. Mi estas ravita de la kvina gvidanto de Oomoto, la majstrino DEGUĈI Kurenai pro la ĉarmo, pura kaj bela figuro, kaj eleganta maniero de agado. Fine, mi elkore dankas la organizintojn de la evento, kiuj ĝin tre bele aranĝis kaj akurate plenumis.

Ĉefredaktorino de La Lanterno Azia  
(oficiala organo de KEA)

# MIAJ SPERTOJ EN OOMOTO KAJ EN JAPANIO

Ildete Barbosa de Aquino  
Brazilo



" Kiel malvarma estas la neĝo!" Senti kaj vidi neĝon estis la unua el inter multaj aliaj spertoj en Japanio. Granda diferenco inter du malproksimaj landoj, donis al mi la oportunun plilarĝigi miajn vidpunktojn pri la vivo. Senĉese dum mia instruado de la lingvo esperanto, mi povis lerni de ili, miaj bonegaj kaj simpatiaj gelernantoj, la japanan vivon kaj kulturon.

Dum mia restado en Japanio mi loĝis en Kameoka, urbo de la gubernio Kioto, monda sidejo de Oomoto, la sankta tereno. Tie mi estis gastigita ĉe Oomoto. Dum ses monatoj mi havis la okazon instrui al Oomotanoj esperanton en pluraj urboj tra Japanio.

Loĝi kaj vivi kun ili montris al mi novajn idealojn. Lernante ankaŭ kelkajn artojn kiel ekzemple teceremonio, ceramikaĵo kaj "rouei", japanaj poemoj, donis al mi grandan trezoron de scio. Lernante tiujn artojn, mi akiris disciplinon, forton kaj amon.

Mi ankaŭ lernis la instruon de Oomoto kaj preparis min mem por disvastigi kaj montri al aliaj homoj tiun bonan mesaĝon.

Mi deziras ke multaj homoj havu la saman sperton, ĉar oni lernas vidi la mondon kiel

hejmo kaj la homaron kiel granda solidara familio.

Kelkajn malfacilaĵojn mi havis: ekzemple kun la manĝaĵoj, kun la klimato kaj kutimoj en Japanio. Sed iom post iom mi povis al kutimiĝi kaj ĝui Japanion.

Japanoj, precize oomotanoj tre bone akceptis min en ilia lando kaj konsideris min kiel fratinton malgraŭ la diferenco de kulturo, lando kaj lingvo. Mi eĉ estis invitita en pluraj hejmoj. Granda honoro por mi.

Por mi estis facile komuniki kun ili, ĉar mi parolas esperanton.

Oomotanoj ankaŭ lernas esperanton, ĉar la religio Oomoto adoptis ĝin por venki la lingvajn barojn kaj helpi la mondpacon kaj interkomprenon. Dank' al esperanto, homoj kun malsamaj lingvoj, landoj kaj religioj povas facile interparoli.

Oomotanoj de Japanio estas nun membroj de mia familio. Mi Oomotaniĝis, kaj mi volas instrui kaj helpi la disvastigon de ĝia instruo.

Mi nun havas multajn geamikojn ĉe la alia flanko de la mondo. Kiel diras la Diaj Revelacioj; "El malproksima lando la Dia afero komencos disvolviĝi".

# *Kun ĝojo mi sekvas la vojon de Oomoto*

*Enkhee Chimedtseren*

*Mongolio*

Japanio estas por mi unu el la plej rave aspiritaj landoj en la mondo. Fakte, ekde kiam mi estis infano, mi imagis Japanion kiel la landon de la eldorado. Feliĉe, antaŭ 2 jaroj mi havis bonan okazon unuafoje viziti Japanion kaj tiam restis nur 3 tagojn en la Centra Oficejo de Oomoto, Kameoka.

Tamen, jam de antaŭe mi aŭdis la nomon "Oomoto" danke al Esperanto kaj al s-ro Dogsuren Chimed, la forpasinta antaŭulo, unu el niaj mongolaj esperantistoj, kiu kontaktis oomotanajn esperantistojn en la 1990-a jaro.

Dum mia restado ĉe Oomoto antaŭ 2 jaroj mi detale eksciis la instruojn de Oomoto kaj ĝi havigis al mi tre mirindan kaj profundan impresojn. Mi pensas, ke tiu unua vizito serioze motivigis min fariĝi oomotano, kaj hieraŭ matene kun granda ĝojo mi faris necesan formalajon por mia oomotaniĝo.

Oomoto ekde sia fondiĝo ĝis nun estas iniciatinto kaj samtempe hegemonianto por akceli la interreligian kunlaboradon por la mondopaco. Kiel vi vidas, en nuna mondo abundas tro multe da abomenaj kaj malbonaj aferoj. Abundas ankaŭ grandaj kaj malgrandaj militoj,



konfliktoj, mortigoj, bataloj inter malsamaj nacioj, gentoj kaj ŝtatoj, ĉefe pro religiaj diskriminacioj kaj miskompreniĝoj inter si.

Oni konsideras, ke homa reciproka respekto kaj ankaŭ interkompreniĝo inter diversaj religioj kaj ideologioj entenas gravajn rolojn kaj valorojn por solvi iun ajn problemon en nia planedo, kaj por konstati eterne pacan kaj perfekte harmonian mondon. Tial, mi senhezite decidis mian oomotaniĝon, kaj nun elkore deziras ke mi plene kontribuu mian homforton por helpe solvi la problemon laŭ la graco de Dio.

Ni, eksterjapanaj esperantistoj bone scias la devizon de Oomoto "Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo", kaj multe emociiĝas, ke interalie Oomoto serioze aprezas ĝian mision kaj konkrete



valorigas en sia agado nian karan lingvon "Esperanto". Ni vidas, ke Esperanto kaj Oomoto havas unu saman celon, kaj ambaŭ instruas al homaro pri la graveco de la ideoj de "homaranismo" kaj "homamo".

Parenneze, Oomoto havas specialan kunligon kaj apartan historion kun mia patrino lando Mongolio. Antaŭ 3 jaroj vizitis Mongolion ĉirkaŭ 200 oomotoj sub la gvido de majstrino DEGUĈĈ Kurenai, la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto. La Oomoto karavana vizito multe kontribuis al ni, mongolaj popolanoj por profundigi la amikecon inter landanoj, kaj per tio pli vaste konigis al ni la ekziston de Oomoto kun japanaj kulturoj.

Danke al tiu vizito mongoloj tiam eksciis, ke jam de antaŭ 80 jaroj majstro DEGUĈĈ Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto, celis al Mongolio por surloke konstrui religie idealan mondon laŭ la gvido de Dio. Koncerne al tio mi aŭdis, ke Chinggis Khaan estis sama persono de japana samurajo nomata "Minamoto-no Jošicune", kiu transmare veturinte atingis Mongolion laŭ japana legendo. Komence, tiu rakonto por mi estis ne facile komprenebla, tamen, poste troviĝis inter malnovaj libroj la unika mongola libro, titolita "Mongola Mistera Historio", verkita en la jaro 1240.

En ĝi ekkomencas jenaj priskriboj: "La Borte Chon, prapatro de Chinggis Khaan, sendita de la supera ĉielregno, kun sia edzino Goo Maral, transvenis trans la maro kaj ekloĝis komence ĉe la riverego

"Onon" kaj ĉe la monto "Burhan Haldun" kiu signifas "Dian Rokmonton". Leginte tiun ĉi priskribon, mi tiom pli sentas simpatiecon al Japanio kaj Oomoto.

Dum longa socialisma periodo en Mongolio, ekde antaŭ la 2-a Mondomilito, mongoloj estis preskaŭ malpermesitaj fari Di-kredon kaj religiajn agadojn. Pro tio nunaj mongolaj mezaĝuloj kaj junuloj bedaŭrinde jam perdis tradiciojn de siaj religioj. El tio sekvas, ke des pli multe abundas krimoj, egoismaj memkondutoj en nuna mongola socio.

En tiu situacio mi tre ĝojas kaj dankas, ke la religio kiel Oomoto kun plenplena homamo laŭ la gvido de majstrino Deguĉi Kurenai, Kjooŝu-sama, povus havigi al ni, mongoloj, gravan kaj esencan instruojn, nome por kio ni homoj, naskiĝas kaj vivas, kaj kion ni homoj devus plenumi en nuna reala mondo kiel la gefiloj kaj kapeloj de Dio.

Ekde la 21-a ĝis la 25-a de septembro dum 5 tagoj mi feliĉe havis la aŭtentikan Oomoto-Kursaron kun la helpo de Esperanta interpretado. Kaj per tio firmigante mian pretecon al Oomoto Di-kredo, mi deziras kuraĝe kaj sincere marŝi sur "la vojo de Dio" same kiel vi, miaj oomotanoj antaŭuloj. Hodiaŭ, profitante tiun ĉi bonan okazon, mi elkore petas de vi, karaj samaj Di-kredantoj, afablajn gvidojn por mi.

Asistanta Profesoro de Socia kaj Scienca Instituto, Ĝenerala Sekretario de Mongola Esperanto-Societo

# Mia vizito ĉe Oomoto

DENNIS KEEFE

USONO

Post la Universala Kongreso en Jokohamo, post la ILEI Konferenco en Ranzan, kaj post semajno de Pasporta Servo en Kioto, restis al mi pli ol du monatoj de mia esperanta vojaĝo en Japanio.

Kien iri? Kion fari? Viziti la Monton Fuji? Trairi la tutan landon per la Pasporta Servo? Ekkoni la multajn famajn budhajn kaj ŝintoajn templojn de Japanio?

Sed pli ol turismi, mi volis lerni pri la homoj, la socio kaj la lingvo. Krome, mi volis lerni pri Esperanto kaj kiamaniere la Japanoj parolas ĝin, kaj ĉefe kiamaniere ili lernas kaj studas ĝin.

Sed pli ol turismi, mi volis lerni pri la homoj, la socio kaj la lingvo. Krome, mi volis lerni pri Esperanto kaj kiamaniere la Japanoj parolas ĝin, kaj ĉefe kiamaniere ili lernas kaj studas ĝin.

Mi pensis, ke eble la plej bona loko por fari tiun lernan, ne turisman, vojaĝon estas ĉe Oomoto.

Mi aŭdis pri Oomoto jam antaŭ pli ol 25 jaroj kiam mi instruis Esperanton en la Liceo de Esperanto en Madrido.

Tie, se mi bone memoras, Juan Carlos Ruiz parolis al mi pri kiamaniere tuta grupo de Japanoj utiligis Esperanton por paroli kun membroj de ilia religia komunumo eksterlande. Tiu ideo enradikiĝis en mia kapo kiel bela ekzemplo de la praktika utiligo de la



internacia lingvo.

Mi neniam forgesis tiun mencion pri Oomoto dum la jaroj, kaj eĉ paroletis pri ĝi kiam mi prelegis aŭ varbis iomete por Esperanto en Usono kaj en Eŭropo.

Jardekoj pasis, kaj subite lastjare pro labor- kaj viv-ŝanĝoj, mi ekhavis la oportunon vojaĝi tra Azio preskaŭ la tutan jaron 2007.

Tiam mi elektis tri landojn: Hindan Union (Barato), Ĉinion, kaj finfine Japanion.

En Hinda Unio organizis mian vojaĝon kaj instruadon de Esperanto Venkatesh Reddy, alinomate Espero Venki. En Ĉinio, Peng Zhengming, alinomate Trigo, kaj en Japanio, nu,

en Japanio mi konis nenium por helpi organizi mian vojaĝon..

Tamen mia longkonata amiko Tacuo Huĝimoto sugestis, ke mi eble provu resti ĉe Oomoto ĉar estos disponeblaj gastĉambroj, kaj eble mi povos instrui Esperanton tie.

Sekve, kiam mi deĵoris ĉe la ILEI stando en la Jokohama UK, Sinjoro Agou, ĝenerala direktoro de la Esperanto-Populariga Asocio (EPA), invitis min tien veni.

Mi finfine alvenis al Oomoto la lastan parton de aŭgusto kaj restis tie ĝis la fino de oktobro, do iomete pli ol du monatojn.

Tiuj du monatoj estis inter la plej interesaj esperantaj tagoj de mia esperanta vivo.

Mi ĉiam ĝojas kiam mi povas interparoli Esperanton kun alilandanoj kiuj flue kaj bele parolas Esperanton. Kaj mi trovis jam en mia unua tago ĉe Oomoto multe da personoj kiuj parolis la internacian lingvon flue kaj bele.

Sed Oomoto plaĉas al mi pro ankaŭ aliaj kialoj. La ritmo de la vivo, la simpleco de multaj kutimoj, la diservoj, kaj la sinceraj, laboremaj homoj ĝojigis mian vivon tie.

La vivritmo tie aspektis, al miaj usonaj okuloj, samtempe rapida kaj malrapida.

Ĉiutage mi havis la grandan privilegion observi la laboron en la oficejo de EPA. La kolegoj tie laboris multe, preparante revuon, kaj antaŭenigante la internacian laboron.

Mi trovis la manĝaĵojn en la komuna manĝejo ege bonaj, sed tamen tre simplaj. Preskaŭ ĉiam la sama rizo kaj la sama supo, sed kun multe da bongustaj surprizoj elirantaj el la kuirejo.

Tamen kelkfoje ne tiom plaĉas al mi la matenmanĝoj, ĉar mi neniam al kutimiĝis al la gusto de maraj plantoj kaj acidaj fiŝaĵoj je la sepa matene. Tamen samtempe mi ĝojis, ke mi povis manĝi same kiel ili.

Tre kortuŝa momento por mi estis ĉe la komenco kiam la Oomatanoj adiaŭis Ildete el Brazilo. Dum la adiaŭa vespero estis Noh-danco, speciala preparo de teo, kaj aliaj japanaj kutimoj kiuj novis al mi.

Dum tiu adiaŭa vespero, mi ĝojis ĉar ili ĝojis, kaj ili ĝojis ĉar Ildete ĝojas.

Ekde mia komenco ĉe la Oomotanoj, mi volis lerni pri ili: ilia historio, iliaj kutimoj, ilia vivmaniero kvazaŭ mi estus etnologo.

La eklernon pri Oomoto faciligis la ĉarmaj personoj kiuj laboris en la oficejo de EPA (Esperanto-Populariga Asocio). Kaj profitante de longaj vojaĝoj al la urboj Ajabe, Osaka, kaj Niigata, mi lernis pli da detaloj de Sinjoro Agou, Sinjoro Hazama, kaj Sinjoro X (Pardonu mi forgesis la nomon de mia ŝoforo kaj kun-instruisto!).

Speciale interesaj estas la du aliaj eksterlandanoj kun kiuj mi rilatis dum mia restado: Bill Roberts, ĵurnalisto-fotisto el Usono, kaj Sinjoro Enkee, nova oomatano el Mongolio.

Mi legis la libron verkitan pri Oomoto de Sinjoro Roberts por kompreni



Oomoton el usona vidpunkto, kaj mi ricevis aldonajn informojn pri la religia aspekto de Sinjoro Enkee, kun kiu mi de tempo al tempo kundividis taseton da sakeo, babilante pri Oomoto, Esperanto, kaj Mongolio.

Dum mi lernis pri Oomoto, mi ankaŭ lernis multe pri la japana vidpunkto rilate la esperantan movadon, ĉar mi multfoje ĉiusemajne profunde interparolis kun Tacuo Huĝimoto, kiu sidas apud mi en la oficejo.

Oni dirus en Usono, ke Tacuo estas “piediranta enciklopedio,” kiu konas kaj komprenas esperantan vivon, gramatikon, kaj strategion, ne nur en japanio, sed tutmonde.

Miaj planoj en Oomoto ŝanĝiĝis dum miaj unuaj tagoj tie. Krom lerni pri Oomoto, mi volis lerni pri la japana lingvo, kaj la specialaj kursoj ĉe Oomoto pri teceremonio, Akido, ceramikaĵoj, Noh-dancoj, kaj aliaj, sed . . .

Pli kaj pli, la ekkonstato, kiun mi forte spertis en Ĉinio, ke mia BEKkurso, kiu tiel bone funkciis por Usonanoj kaj Eŭropanoj, ne tutbone funkciis por la azianoj.

Fakte, mi jam komencis reverki la BEKkurson, adaptante ĝin al la bezonoj de Azianoj, kiam mi estis en Ĉinio, unue ĉe la domo de Peng Zhengming en Wuhano, kaj poste speciale ĉe la budhana templo de Duobao-si, kun la kunlaboro de bonzo Miaohui, kie mi gvidis 70-horan kurson dum majo kaj junio.

Tiu nova kurso naskiĝanta en

Ĉinio, mi reverkis en Japanio, kreante novajn paĝojn kaj ekzercarojn. Kaj estis en Kameoka, eble en la tria semajno de mia restado, kiam mi decidis dediĉi min centelcente al la tasko finverki la specialan BEKkurson por Azianoj.

Tiun kurson mi nomis PEPAS (Paroliga Ekzercaro Por Azianaj Samideanoj), kaj mi laboris por fini ĝin preskaŭ la tutan tagon kaj nokton. Mi multe dankas al Oomoto pro la fakto, ke ili permesis al mi utiligi la oficejon de la frua mateno ĝis la malfrua vespero.

Estis ĝoje provi tiujn novajn ekzercerojn de PEPAS rekte kun la Oomatoj kaj kun aliaj Esperantistoj kiuj loĝis en Kameoka kaj Osaka, speciale en Nara kaj Kioto. La kurso nun havas pli ol ducent paĝojn, kaj mi komencis meti partojn el ili sur la interreto ĉe [www.bekkurso.info](http://www.bekkurso.info)

Pro Esperanto, pro Oomoto mem, mi ŝatis tiujn somerajn kaj aŭtunajn tagojn en la Oomota centro de Kameoko, Japanio. Mi esperas iam reviziti, kaj ankaŭ rekomendas al spertaj Esperantistoj, ke ili mem iam ekkonu tiun specialan kaj pacan etoson de Oomoto en tiu pitoreska urbeto apud montaro.

tria parto

**ĈION KREAS LA ANIMO**

1

Hidemaru Deguĉi, tradukis Eizo Ito

***For argumento!***

Kiam mi pasigas la tutan tagon,  
 Senĝene farante ion kaj tion laŭvole  
 En granda ĝojo kaj kun pura koro  
 --koro kunfandiĝinta en universon,  
 Mi sentas min delikate vualia  
 Per diversaj koloroj; verda, roza, purpura.

Kvankam la homoj en la mondo  
 Je bagatelo timas, ĉagreniĝas, koleras,  
 En la okuloj vidantaj la eternon kaj  
 senlimon,  
 Ĉio estas bona, ĉio estas interesa.

Anstataŭ kulpigi homojn,  
 Mi nur apogos min al Dio.  
 Jen mirindaj muzikoj,  
 Belegaj floroj  
 Senĉese naskiĝas sur la tero!  
 Jes, mi aŭskultu ilin,  
 Jes, mi rigardu kaj kulturu ilin,  
 Kun senlima plezuro!

Nur homo, kiu memspertis diversajn  
 temperamentojn kaj diversajn  
 aferojn, povas vere kompreni alies  
 temperamenton.

Ni foje havas tre fortan pekosenton kaj  
 foje tute ne sentas pekon.

Kiam ni havas fortan pekosenton, ni ĝenas  
 nin stariĝi antaŭ homo vid-al-vide kaj eĉ  
 hontas iri al loko lumoplana. Alian fojon  
 ni tute trankvile renkontas homojn kaj  
 babilas laŭplaĉe.

Ĉu io estas ĝoja aŭ malĝoja, tio tute ne  
 venas de rezonado.

Ĉar homo ne estas kreita per homa  
 rezonado, oni ne devas trakti homon per  
 rezono.

Ne timu pri la estonteco laŭ homa kalkulo!

***Dezirata estas kompetenta kapo***

Vere abomeninda estas la mondo, plena  
 de egoismo kaj memalkroĉiĝo.

Observate de flanke la plejparto da homaj  
 agoj estas memamo, kiu senĝene kaŭzas  
 ĝenon al aliaj.

Mi nun legas "Azuma kagami" (Historia  
 literaturo pri la periodo [1181-1268]) kaj  
 senkonscie lamentas pro mizereco de  
 l' homa mondo. Ĉiufoje kiam mi legas

historion, mi estas forte impresita de la malpureco de la homo, kaj nuntempe la afero estas pli serioza, ol en antikveco.

Vivi en tia mondo estas afero kolerinda, pli ol sensenca. Mi ne scias, ĉu la homo estas ido de Dio aŭ de Satano, sed mi miras kiel eta, senvalora, mizera estaĵo estas la homo, kvankam "ĝi" orgojle kondukas kvazaŭ io respektinda. Ne esprimebla malĝojo min kaptas kiam mi min rigardas pensante ke mi estas unu el ĝia specio.

Aŭtentika laboro elfariĝas, nur kiam kolektiĝas aŭtentikaj homoj. Se la kapo de iu organizo estas ne aŭtentika, tie okazas nur malbona administrado. La kupro ne povas anstataŭi la oron, kiom ajn oni ĝin poluru.

Se la supro ne puriĝas, la malsupro neniel povas puriĝi, ĝi devas ĉiam toleri en malkontento. Se malpura akvo enverŝiĝas en supran fluon de l' rivero, la tuta rivero malpuriĝas, eĉ se pura akvo eniras en malsupran fluon. En ĉio plej grava estas la origino aŭ radiko.

Venas ĉevalo al grupo de ĉevaloj, venas cervo al grupo de cervoj.

La turo falas, se ĝia centro kliniĝas.

Kiom da politikistoj ĝis nun aperis, kiuj vere sin oferis nur por la bono de la mondo aŭ la lando? Eble ne pli multe ol steloj post la tagiĝo!

Atente observu, kiom dolore penas la homo por sin kovri!

La grandeco de la persono estas grandeco de lia animo, grandeco de la kvanto kaj

kvalito de lia animo, grandeco de lia energio, de lia kapablo kaj de lia laboro.

Homo, kiu montriĝas respektinda en la okuloj de bananuloj, ne estas vere respektinda. Ago de vere respektinda homo, ne estas facile taksebla de banalaj homoj.

Kiel diferencas opinio de infano dis de tiu de maturulo, tiel same diferencas la sensumo de grandulo dis de tiu de ordinarulo. Grandulon rekonas nur grandulo.

Homo, kiu iel imponas min dum interrilatado, estas pli supera, ol mi.

Tio ne dependas de lia instruiteco aŭ situacio nek de familia deveno.

La supereco de homo neniel estas en lia aposteriora inteligenteco nek en artaj kapabloj. Post ĉio ĝi estas en lia primara naturo alivorte animo. Tion oni devas bone kompreni.

Aliflanke ne mankas ekzemploj, ke kompleta egoisto ruze kondukas, starante sur la supro de organizo. Tio tamen baldaŭ ĉesos laŭ plialtiĝo de la memkonscio kaj kulturo de la socianoj.

Supera homo estas tia, kia kapablas solvi problemojn en interparolado ridanta.

Homo, kiu spertis grandajn sortoŝanĝojn, bonegajn kaj malbonegajn, povas esti tiom pli grandanima.

Homo, kiu fariĝis eminenta en iu ajn fako,



ne faras bruon.

S-roj Manoj pensis: “Dank’ al ni aliaj membroj povas manĝi kaj trinki.”

S-roj Piedoj pensis: “Dank’ al ni ĉiuj aliaj povas viziti diversajn lokojn.” S-roj Stomako, Pulmoj, Koro ---ĉiuj respektive taksis sin la plej valoraj kaj la aliaj sentaŭgaj.

Foje ili kolektiĝis por havi konferencon.

“Oni devas iel rekonstrui kaj pli bonigi ĉi tiun korpon.”

Tio estis ĉies komuna deziro sincera.

S-roj Manoj kaj Piedoj kune parolis: “Ni ĉiam pene laboras kovritaj de polvo kaj ŝvito por nutri vin ĉiujn.”

S-ro Koro kapjesis: “Jes, mi simpatias vin, sed bonvolu pensi ankaŭ pri mi, kiu senhalte laboras tag-nokton sangoverŝita.”

Li plu aldonis: “La plej dorlotata estas Stomako, kiu manĝas bongustaĵojn trifoje ĉiutage, kaj intertempe nur ripozas senlabore. Ni ne povas ne plendi pro tia estaĵo.”

S-ro Stomako ofendiĝis: “Mi neniam petis tian rolon laŭ mia deziro. Jes, mi manĝas bongustaĵon ĉiutage, sed tion mi faras je servo al vi, ĉiuj. La neta nutraĵo estas distribuata al vi kaj restas en mi nur la rekremento provizore. Se iu deziras, mi volonte donos mian lokon al li.”

“Do ni transprenu vian lokon!”

Pulmoj montris entuziasmon.

Tiel la konferenco neniam venis al bona konkludo.

S-ino Umbiliko vesperis aŭdinte tiun diskuton komplikan, malamikan, pikan histerikan, komikan kaj timante, ke

tiamaniere la korpo ne restos en ordo plu, volis ien translokiĝi.\*

Tiam aperis Ges-roj Oreloj, forvenintaj el la konferenco kaj alparolis: “Ĉu ne estas S-ino Umbiliko, kiu tie grumblas? Ni ankaŭ forlasis la konferencon, ne tolerante aŭdi la absurdajn diskutojn.”

Venis ankaŭ S-inoj Okuloj, larmoplenaj, verŝajne pro pugnobato, dirante: “Ni ja vidis teruran scenon!”

Tuj sekvis S-ra Moŝto Nazo, grumblante: “Mi trovis nenium, de kiu mi povus flari ion bonan!”

Umbiliko konklude diris: “Post ĉio, ni bezonas la kapon – la estron, kiu unuecigas ĉiujn. Sen ĝi neniam estiĝos bona ordo, dum ĉiuj membroj respektive fieras nur sian kapablon.”

Iu diris: “Ni jam havas la estron. Ĉu ne ni elektis S-ran Moŝton Nazo, kiel la prezidanton, kiu rajtas ĉion ordigi?”

Oreloj denove ofendiĝis, montrante mienon, ne toleri aŭdi tian argumenton.

“Vere?” – Umbiliko eldiris, mallaŭtigante la voĉon, “Sed nenio helpas, sen vera, aŭtentika kapo, ĉu ne?”

Umbiliko jam decidis sin transloki ien.

\*Noto de tradukisto; Estas japana diraĵo esprimi eksplodemon de ridego: “La umbiliko volas translokiĝi.”

### ***Bongusto de la homa vivo***

Ĉar ĉiu estas dotita per ia forta punkto, kia ajn homo povas fariĝi distingita en iu senco, nur se li elmontras sian fortan punkton.

Rondaj kaj glataj ŝtonetoj kuŝantaj sur la riverflanko estiĝis nur post longa tempo de diversaj spertoj de rompiĝo, transportiĝado per riverfluo kaj tiel de poluriĝado. Same kun homoj. Por atingi la maturecon homo devas nepre sperti la sovaĝajn ondojn de la monda maro. Eĉ la plej supera homo povas fariĝi vera homo nur post tridekjaraĝo. Ĝis tiam estas la periodo de sindisciplinado. Dum la juneco la penso estas tro simpla kaj mankas profunda konsidero. Eĉ homo, kiu estas respektata kiel saĝulo, montras ian mankon rilate la pezon aŭ dignon de la personeco.

La homa komuna saĝo estas io alia ol la instruiteco.

La junuloj estas puraj kaj idealistoj kaj pro tio ili disreviĝas kaj suferas, enirinte en la realan mondon, kiu estas tro distanca al la idealo. Tion oni povas facile kompreni. Jes, la realo estas tiel malpura; jes, ĝuste tial oni ne devas difekti nek perdi la idealon.

Kiam vi ne decidis kiel fari,  
Ĉiuokaze marŝu antaŭen!  
Kiam vi timas malsukceson,  
Kuraĝe provu preta je malsukceso.  
Kiam oni malsukcesas unu fojon,  
Tre granda estas la peno reordigi.  
Sed tio ankaŭ povas esti interesa kaj dankinda.  
Oni povas kompreni la mondon nur post spertado  
de ĉio bona kaj malbona.

La homa koro estas simila al peco da nubo pendanta en la ĉielo. Ĝi facile moviĝas pro eta motivo supren aŭ malsupren, antaŭen aŭ malantaŭen, dekstren aŭ maldekstren. Kaj la homo t.e. la memo estas la kondukisto kiu devas direkti la “nubon” ĉiumomente plej bone.

La koro ne facile komuniĝas al alia, sen manifestiĝi en ia formo. Eĉ simpla formalaĵo povas ĝojigi alian kiu ĝin ricevis. Ni devas respekti la formalon kondiĉe ke ni ne enfalu en ĝian malbonon.

Eĉ unu eno da mono mirinde brilas laŭ maniero de elspezo. La efiko de io multe diferencas laŭ tio, ĉu ĝi kaptis la ĝustan ŝancon aŭ ne.

Estas eraro ke ni kutimas taksii la valoron de io nur laŭ ĝia kvanto. La grandeco de la kvanto neniel estas la absoluta grandeco.

Kio plej efike mildigas la koron de homoj kaj interamikigas ilin, tio estas la vortanimo (vortoj).

Kiom ajn ni uzu la vortanimon, ĝi neniam elĉerpiĝas nek kaŭzas ian malprofiton. Tial dum la vivo ni uzu kiel eble multe da vortoj bonaj kaj belaj por elmontri ilian utilon.

Mizantropo t.e. ke homo malŝatas homojn ja estas terura abnormalo.

Estas naturo, ke oni sentas agrablon en la vivo kaj vidas ĉiujn homojn, kiel intimajn amikojn. Dank’ al la perado de la vortanimo ni devas kiel elbe ĝui la

amikecon kaj amon inter ni reciproke.

Neniu koleras pro laŭdo, neniu ĝojas insulton.

Kio plej severe pentigas homon, tio estas vortoj sovaĝaj, maldelikataj eldiritaj de li mem.

Eĉ la plej terura fripono tenas diecon ie en la naturo. La vortoj bonaj kaj belaj eltiras tiun diecon.

Laŭ la teorio de interrespondeco la bonaj vortoj elvokas bonan volon kaj malbonaj vortoj malbonan volon.

Por homo plej malfacile tolereble estas, kiam lia animo estas intence vundita.

La homa koro estas tiel delikata ke ĝi pro bagatelaĵo tuj malĝojas aŭ tuj ekĝojas.

Laŭ la situacio ŝanĝiĝas la homa temperamento.

Eĉ la plej iluminita persono ne eviteble sentas maltrankvilecon en la koro, kiam lia vivtenado ne estas sur stabila bazo.

En la somero oni sentas varmegon, en la vintro suferas froston; sentas doloron en mizero, kaj koleriĝas kiam iu ofendas.

Homo bone edifita nur iamaniere turnas tiajn malagrablajojn.

Iuj homoj penas sin disciplini por esti tiaj, kiaj neniam koleras je kia ajn okazo. Ili metas tion kiel la finan celon de la disciplinado. Tion mi komprenas, sed tia ne estas nia idealo. Nia idealo estas ke homo kolere en necesa okazo kaj neniam kolere, kiam ne decas kolere.

Homo, kiu aspektas gaja ekstere, estas

soleca en sia interno. Inverse, homo aspektanta negativa laŭ eksteraĵo, ofte estas mala interne. Koleremulo unuflanke estas facile alirebla por amikiĝi, dum homo kiu penas ne montri ofendiĝon, estas iel malfacila por intimiĝi.

Ĉiuokaze ŝatinda estas homo, kiu donas simpatian trankvilecon en kunestado.

Post ĉio rekomendinde estas ke homo ĉiam penadu direkte al ia celo. Se li perdos intereson survoje, li strebu direkte al nova celo.

Neniu estas pli kompatinda ol homo, kiu ne havas celon, restante kontenta pri la nuna stato.

Nenio plenumiĝas en la reala mondo, se oni ne havas kapablon taŭgan al la reala mondo.





